UDK 001(05)=089.2
YU ISSN 0048-9557

# SCIENCA REVUO

Vol. 26, n-ro 3(113)
30.6.1975.

Aperas 6-foje jare. Jarabono 56 steloj, 15 ned.gld., 6 us.dol., 100 jug.din.

ENHAVO:

*T.Tyblewski*: Edukaj fenomenoj de la turismo
*A.Medgyes*: Kondensiĝaj problemoj en la kamentuboj ĉe gashejtado
*B.V.Tokarev*: Energio de hidrogena atomo
*A.Rodriguez*: Determino de transformatora konektogrupo
*J.Chvosta*: La dekdu monatoj

## EDUKAJ FENOMENOJ DE LA TURISMO

(T. Tyblewski, JELENIA GÓRA, Pollando)

Esperantistoj havas profundan motivaron por vojaĝi. La ĉefa - kaj ofte la sola - motivo de ilia vojaĝo eksterlanden estas la bezono uzi Esperanton en la evidenta situacio, t.e. en la grupo de diversnaciaj eksterlandanoj. La eblecon efektivigi tian bezonon kreas plejparte diversaj konferencoj, simpozioj, tendaroj kaj kongresoj, da kiuj en unu jaro okazadas pli ol 60 - aranĝataj de esperantistoj en la tuta mondo. Esperantistoj estas do turistoj. Pri la lastaj oni difinas jene: "Turisto - la persono vojaĝanta plezurcele..."*/ En la aliaj difinoj oni substrekas "la emon vojaĝi *senprofite*". Turisto estas tiu, kiu plezurcele, sed senprofite strebas al alia loko por la tempo ne pli longa ol 6 monatoj.

Inter esperantisto kaj turisto estas tiom da kongrueco, ke oni rajtas identigi ilin - almenaŭ motivsence.

---

*/ Internacia turisma vortaro. Monaco 1961, L'Académie Internationale du Tourisme à Monte-Carlo, p.133 (pola eldono).

## LA ENKETITOJ

Esplorante la edukajn fenomenojn de turismo, mi opiniis esperantistaron la plej konforma esplorfonto. En subaj alineoj vi trovos la rezultojn. Bonvolu konkludi mem.

Al elektitaj adresoj de la fakdelegitoj pri turismo (laŭ JARLIBRO de UEA) estis sendataj presitaj demandiloj. El la suma kvanto de 820 ekz. (du eldonoj - 500 + 320) revenis al Jelenia Góra 267 ekz. t.e. 34,9%. Oni rajtas supozi, ke parto de la presaĵoj ekinteresigis la kolektantojn kaj eniris iliajn kolektojn.

Okazadis, ke la demandilo revenis el alia lando ol ĝi estas sendita (al Aŭstrio el Francio, al Ĉeĥoslovakio el Hungario).

Aparta grupo de la respondintoj estis la partoprenantoj de Internacia Feriado en Międzygórze (Pollando) aŭ aŭskultantoj de miaj prelegoj en Francio.

Rezulte alvenis respondoj el:

| Lando | Nombro | % de la reakiritaj |
|---|---|---|
| Ĉeĥoslovakio | 48 | 18,5 |
| Finnlando | 30 | 11,5 |
| Hungario | 28 | 10,7 |
| Pollando | 26 | 9,8 |
| Francio | 23 | 8,9 |
| Germ. Dem. Resp. | 20 | 7,9 |
| Sovetunio (Estona kaj Rusa Respublikoj) | 13 | 5,1 |
| Italio | 12 | 4,9 |
| Belgio, Bulgario | po 7 | |
| Svislando, Svedio kaj Britijo | po 6 | |
| Japanio kaj Germanio | po 5 | |
| Kanado | 4 | |
| Aŭstralio, Nederlando | po 3 | |
| Aŭstrio, Usono | po 2 | |
| Argentino, Danio, Hispanio Irako, Israelo, Jugoslavio, Novzelando kaj Rumanio | po 1 | |

Neniu respondo venis el Brazilo. Kvin personoj aldonis vastajn leterojn. Unu finno deklaris helpon en kolektado de la respondoj.

La esploritaro ampleksis 73 virinojn (27,5%) kaj 192 virojn (72,5%). Instruitaj ili estis:

elemente - 35 (13,2%), meze - 122 (46,0%), supere - 107 (40,4%). Unu respondinto evidentiĝis aŭtodidakto sen la formala instruiteco. Laŭaĝe la respondintoj dividiĝis jene:

| Aĝo | 19-25 | 26-35 | 36-45 | 46-55 | 56-65 | 66-75 | 76-85 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Nombro | 11 | 33 | 58 | 46 | 75 | 37 | 5 |
| % | 3,8 | 12,5 | 21,8 | 17,4 | 28,3 | 14,0 | 1,9 |

Inter ili estis 54 instruistoj, 12 profesoroj kaj docentoj, 44 oficistoj, 11 laboristoj, 11 direktoroj, 10 inĝenieroj, 8 fervojistoj, po 6 kuracistoj kaj teknikistoj, 5 studentoj, po 4 bibliotekistoj, ĵurnalistoj, ekonomiistoj, komercistoj, vendistinoj, librotenistoj kaj tradukistoj, po 3 asekuristoj, arkitektoj, elektronistoj, dommastrinoj, flegistinoj kaj juristoj, po 2 presistoj, kudristoj, ĝardenistoj, seruristoj, laborantinoj kaj pordistoj, po 1 artisto, agronomo, senlaborulo, urbestro, ceramikisto, ĉarpentisto, junulaktivulo, elektromuntisto, fotisto, geologo, bindisto, kasistino, libristo, pastro, ŝoforo, konstruisto, desegnisto, leterportisto, arbaristo, magazenisto, mikrobiologo, muntisto, muzikisto, akuŝistino, industriisto, telefonisto, verkisto, kolonelo, kulturaganto, hotelisto, metiisto, skulptistino, eksperto, stenografistino, vendejestro, tapetisto kaj lernantino.

La demandilo enhavis 6 konstatojn, el kiuj 2 asertajn kaj 4 demandajn; du - fermitajn kaj kvar - apertajn.

## KIOM KAJ KIAL ONI EKSKURSAS?

1. Vi ekskursas: a/ entute ne, b/malofte, c/neofte, d/ofte - alportis la respondojn, ke du personoj entute ne ekskursis (93 kaj 78 jaraĝaj); malofte - 26 personoj; neofte - 84 kaj ofte - 153 (58,0%) personoj.

Je la *demando 2*: Kio vin plej interesas dum la ekskursado? oni respondis diverse, menciante laŭvole la nomojn kaj difinojn. Plej ofte

oni menciis la n a t u r o n, kies elementoj estas nomitaj:

| | | | |
|---|---|---|---|
| la naturo | - 52 foje | ĉirkaúaĵoj | - 5 foje |
| pejzaĝoj | - 23 | bona aero | - 3 |
| vidaĵoj | - 42 | panoramoj | - 5 |
| maro | - 5 | grotoj | - 2 |
| montaro | - 7 | la naturbelo | - 18 |
| arbaroj | - 3 | la suno | - 1 |
| ebenaĵoj | - 1 | | |
| sume | | 167 foje | (63,5%) |

L a h o m o j n oni menciis aŭ simple aŭ en diversaj kuntekstoj sume 145 foje: la homoj, kontaktoj kun ili, kontaktoj kun esperantistoj, loĝantoj, rilatoj, laboro, politiko, nacio, vivo de la homoj, vivmaniero, ekkonatiĝoj, virinoj, eksterlandanoj, vizitoj ĉe amikoj, vivkondiĉoj, socio, psiko, karakteroj, vivnivelo,konceptoj, kongresoj, trafiko, vivritmo, kostumoj, salajroj, kulturo, kutimoj.

Inter aliaj interesiĝoj oni nomis: historion (28), monumentojn (24), arkitekturon (23), muzeojn (22), antikvaĵojn (17), urbojn (14), arton (10), folkloron (7), ripozon (4), novajn konstruaĵojn, lokajn nutraĵojn, vendejojn - po 3, dancojn, ekonomion, trankvilon, teatron, elfosaĵojn, restaŭradojn - po 2 kaj popolkulturon, popolarton, popolkonstruadon, vilaĝojn, koncertojn, kinon, artklasikulojn, historion de arto, etnografion, geologion, psikologion, migradon, tendumadon, neantaŭviditajn situaciojn, spurojn de historio, spektaklojn sur natura fono, vinon, naĝadon, dokumentojn, ruinojn, batalkampojn, legendojn, industrion kaj unikaĵojn - po 1.

## LA ROLO DE ĈIĈERONO

*La demando 3:* Ĉu ekskursante vi preferas nur percepti mem la vidaĵojn aŭ sciiĝi pri ili de ĉiĉerono? - kun *la peto 4:* Bonvolu argumenti la opinion - donis jenajn respondojn:

| sen respondo | volas kunigi unu kun la dua | preferas percepti m e m | preferas sciiĝi de ĉiĉerono |
|---|---|---|---|
| 6 | 47 | 77 - 29,5% | 135 - 50,9% |

Argumentante *por la ĉiĉerono* oni konstatis:

"Ĉiĉerono kapablas malkovri por mi detalojn, kiuj estas necesaj al mi, por ke mi povu juĝi." (Akuŝistino el Belgio, 50 j.),

"Mi fidas al ĉiĉerona erudicio" (Oficistino el Ĉeĥoslovakio,30 j.),

"Eksterlande ĉiĉerono estas necesa" (Komercisto el GDR, 66 j.),

"Sen ĉiĉerono mi povas preteriri ĝuste la plej interesajn vidindaĵojn, ne sciante pri ili" (Juristo el Hungario, 60 j.),

"Sen ĉiĉerono mi ne havos klarigojn pri tio, kion mi vidas kaj ne trovos tion, kion mi serĉas" (Komercisto el Italio, 47 j.),

"Ne sufiĉas nur vidi, sed ankaŭ scii kion oni vidas, nur tiam oni povas ĝui la vidindaĵojn" (Studento el Rumanio, 22 j.),

"La fontoj de informado ne estas akireblaj, la materialoj estas tro vastaj por ĉerpi la plej gravan" (Ekonomiisto el Estonio, 56 j.),

"Ĉiĉerono pli bone scias la vidatan lokon kaj povas gvidi al vidindaĵojn sen malŝparo de tempo" (Instruistino el Novzelando, 75 j.),

"Perceptante nur mem mi ne komprenas la originon kaj interrilatojn de la vidataĵoj nek ilian evoluon" (Skulptistino el Finnlando, 57 j.),

"Oni ofte ekscias aferojn pri monumento aŭ loko, kiuj ne estas menciitaj en la gvidlibroj" (Fervojisto el Francio, 56 j.),

"Pli facile mi komprenas la aferojn" (Direktoro el Hispanio, 48 j.),

"Ĉiĉerono, kiu komprenas, ke la vojaĝgrupo ne konsistas el vivantaj enciklopedioj pri la historio de la lando, povas multe pli klerigi ĝin ol papago riperanta jarnombrojn" (Tradukisto el Japanio, 43 j.),

"Perceptante mem, mi nur sentas; sed la scion mi preferas atingi de ĉiĉerono, kiu ja devas esti preparita kredinde informi" (Verkisto el Pollando, 38 j.).

La argumentado *por percepti mem* enhavas opiniojn, kiajn oni povas klasifiki kiel *la kontraŭĉiĉeronajn*. Ili estas pasie kritikaj kaj permesas konkludi pri forto de la travivoj kaj daŭreco de la rememoroj ĉe diversaj opiniantoj.

La parto de Esperantaj turistoj preferas vizitadi sen ĉiĉerono, ĉar: li rapidigas ekskurson; montras supraĵe, kion li volas; ĉiĉeronoj deklamas ellernitajn lecionojn; ili parolas ne pri tio, kio interesas turistojn; ili parolas tro multe pri historio; ili estas enuigaj; ili ofte rakontas malveron.

Jen kelkaj citaĵoj:

"La profesia ĉiĉeronado estas ofte supraĵa kaj rutina. Irante sola, mi ricevas senperajn impresojn kaj povas elekti mem la rigardataĵojn" (Vicliceestro el Skotlando, 46 j.),

"Ne plaĉas al mi mekanika muziko kaj babilemaj ĉiĉeronoj kun laŭtparoliloj" (Instruistino el Aŭstralio, 70 j.),

"La scio de tn. ĉiĉeronoj ŝajnas al mi tro ofte supraĵa kaj eĉ fuŝa" (Geologo el Ĉehoslovakio, 49 j.),

"Mi havas eblecon ekkoni ĉion de diversaj homoj en iliaj landoj" (Vendistino el Danlando, 59 j.),

"Perceptante mem, oni povas profundiĝi en la plej preferatajn objektojn sendepende de aliaj, kiuj ne interesiĝas pri la samaj" (Instruistino el Finnlando, 41 j.),

"Respondo ne venu antaŭ demando; demando formiĝas nur en silenta solperceptado" (Pastro el Suomio, 59 j.),

"Kial ĉiĉerono?! Mi preferas tute sola ŝati miajn trovaĵojn!" (Instruisto el Francio, 31 j.),

"Ekzistas speco de ĉiĉeronoj priparolantaj la belecon de la naturo per seninterrompa atentigo je io kaj krome superfluo da nenecesaj informoj malhelpas efikan ripozadon" (Studento el Germ. Demokrata Resp., 27 j.),

"Se la ĉiĉerono kvazaŭ voĉlegas plengorĝe geografian, historian legaĵon, mi preferas sola viziti kaj havi kun mi modernan kasetmagnetofonon" (Komisiito de turisma agentejo el Japanio, 57 j.),

"Mi ŝatas ĝui la tn. "Ĝojon de invento" kaj la ĉiĉeronoj tre malofte donas ian animan senton al la prezento de iu aŭ io!" (Administra organizanto el Hungario, 30 j.).

47 el la esploritoj (18,8%) deziris kunigi la privilegion de memperceptado kun klarigoj de ĉiĉerono, kvankam tia alternativo ne estis proponita. Ili argumentis jene:

"Klarigoj de bona ĉiĉerono ĉiam estas bonvenaj; vidindaĵoj konataj ne bezonas klarigon" (Tornisto el Bulgario, 42 j.),

"Mi plej ŝatas vagadi sola, sed estas bone povi en taŭga okazo fari demandojn al iu" (Tradukisto el Finnlando, 47 j.),

"Kiam mi vojaĝas, estas ferio por mi, do mi preferas esti tute libera; tamen, kiam la tempo urĝas, mi sekvas gvidanton" (Eksinstruisto el Francio, 58 j.),

"Eĉ ne oficiala turist-akompananto, sed ĉefe entuziasma homo, amanta belon, arton, pejzaĝojn kaj kulturtradicion" (Interpretisto el Italio, 32 j.),

"Vizitante naturbelaĵojn, mi preferas ĝui mem specialan etoson, sed kiam mi rigardas konstruaĵojn, mi volas sciiĝi pri ili de ĉiĉerono" (Bibliotekisto el Pollando, 24 j.),

"Plejparte mem, sed eventuala ĉiĉerono aŭ alia gvidanto ne tro facile enfalu en tro detalajn klarigojn, sed vere klarigu esencaĵojn, kiuj adekvatiĝas al la personoj" (Muzikisto el Svedio, 39 j.),

"Propra okulo estas la reĝo! Ĉiĉeronoj povas esti sub influo de sia maestro, ili povas ne ĉion prezenti; ili estas utilaj nur por respondi al demandoj, se ili konas lingvon. Mi estis en 6 landoj, ĉiam sen oficiala ĉiĉerono" (Elektrikisto el Estonio, 58 j.),

Sume 180 (preskaŭ 70,0%) respondintoj, kvankam kun diversaj klaŭzoj, opiniis ĉiĉeronon bezona dum ekskursado.

La opinioj permesas konkludi, ke la malemo esti akompanata de ĉiĉeronoj devenas de la negativaj spertoj propraj aŭ de ies informoj pri tiaj. Oni agnoskis ĉiĉeronon n e c e s a dum vizitado de antikvaĵoj, muzeoj, urboj, monumentoj, galerioj kaj ĉie, kie estas bezona detala scio, dume ĉiĉerono malhelpas dum kunesto kun la naturo kaj ĝiaj devenaĵoj.

Se la ekskurso povas liberigi turistojn de la tipaj, ĉiutagaj dependoj kaj limigoj, la ĉiĉerono ne estas dezirata.

*La demando 6.* Kiajn ecojn de ĉiĉerono vi opinias la plej konformaj? - alportis la respondojn, laŭ kiuj oni povas prezenti modelon, deziratan de la esploritoj. Laŭ la nombro de la samaj opinioj la ĉefaj ecoj de ĉiĉerono estas a f a b l e c o, vasta s c i o kaj bona h u m o r o

(po 10%). Oni indikis, ke ankaŭ:

bona prononco, forta voĉo, bona lingvokono, Esperanto-scio, plena kono de la ĉirkaŭaĵo kaj regiono, pacienco, inteligenteco, alta kulturo, objektivismo, modesteco, ŝatemo de sia profesio, bona stilo, sperto, respondeco, scipovo respondi je demandoj, erudicio, favoremo, bona aspekto,organiza scipovo, diskretemo, modereco, vastaj horizontoj, kono de psikologio kaj pedagogio, seriozeco kaj kono de la turismaj celoj - estas konformaj ecoj de ĉiĉerono.

Oni ankaŭ substrekis, ke estas dezirataj: "voĉo, kiu altiras atenton", "konscio pri la elementaj diferencoj inter la propra kaj ies patrujoj","atento por tuta grupo","kutimo aranĝi sufiĉe longajn paŭzojn", "afableco ne komerca, sed la amika", "kuraĝo konfesi sian nekonon de detaloj", "ĉiĉerono devas vere ami sian landon".

## LA ROLO DE LA INTERNACIA LINGVO

Per *la demando* 5. Ĉu la Lingvo Internacia faciligis vian turisman sorton, kiel? - mi akiris la respondojn,kiuj akorde konfirmas taŭgecon de Esperanto en la turismo. 87,9% de la respondintoj substrekis diversforman helpon ĝuitan per Esperanto dank' al la esperantistaro kaj en 27,5% ĝuste la lingvo internacia estis agnoskata la senpera kaŭzo de la ekturistiĝo.

"Mi vojaĝis en multaj landoj nur por Esperantaj kunvenoj kaj per E-amikoj" (angla ŝtatoficisto, 64 j.),

"Ĝi estas tre utila por la kontaktoj starigataj" (argentina asekuristo, 60 j.),

"Jes, en Japanujo kaj en Usono amikoj tre helpas" (australia instruistino, 60 j.),

"Per interesaj klarigoj de samideanoj, ekz. en Jugoslavio kaj Francio" (aŭstria ŝtatoficisto, 60 j.),

"Ĉiam, ĉar amikoj montras al mi ĉion" (bulgara docento, 64 j.),

"Kompreneble jes, Esperanto estas treege utila en internaciaj turismaj rilatoj" (belga komercisto, 42 j.),

"Jes, mi ĉie trovas bonajn amikojn kaj korajn konsilojn" (ĉeĥoslovaka magazenisto, 56 j.),

"Certe, precipe ne malgrandaj landoj" (finna oficistino, 27 j.),

"Ĉiam mi kontaktiĝas kun geesperantistoj post alveno al fremda lando" (finna terkulturisto, 29 j.),

"Jes, ĉar per Esperanto mi laŭdezire kaj pli bone ol per alia lingvo ricevas de konatuloj bezonajn sciigojn" (franca instruisto),

"Jes, mi kontaktiĝas kun pli multe da fremduloj en la hotelo" (franca hotelhelpanto, 21 j.),

"Unika ebleco interkontaktiĝi, vizito pli bone antaŭpreparebla per helpo de lokaj esperantistoj" (germana studento, 21 j.),

"Laŭ mia sperto la enlandanoj ofte ne komprenas, ke iu por ili ĉiutaga, enuiga detalo signifas "travivaĵon" por eksterlandano. Esperanto ofte helpas en tio". (serba inĝenierino el G.D.R., 35 j.),

"Jes, esperantistoj ĉiam estas helpemaj" (hungara oficistino, 59 j.),

"Sen Esperanto mi certe ne estus vizitinta kelkajn landojn" (hungara juristo, 60 j.),

"Jes, per ĝi eksterlande mi sentas min hejme" (hispana direktoro, 48 j.),

"Ĝis nun ne, eble ĉar mi ankoraŭ ne vojaĝis aparte en Esperantujon" (iraka komercisto, 43 j.),

"Jes, ĝi permesas al mi ŝpari la tempon" (itala fervojisto, 58 j.),

"Jes, kiam mi vizitis Eŭropon, mi kontaktiĝis antaŭe kun samideanoj en ĉiuj urboj" (japana profesoro, 63 j.),

"En multaj landoj mi sentis min hejme dank' al afablaj, volontulaj ĉiĉeronoj" (kanada instruistino, 62 j.),

"Jes, ĉie mi trovas utilan helpon" (monaka inĝeniero, 79 j.),

"Pro E-kongresoj mi vizitis pli ol dek landojn!" (nederlanda lernejprizorgisto, 63 j.),

"Mi ne imagas jam vojaĝi eksterlanden sen kono de Esperanto - ĉion, kion bezonas turisto" (pola oficistino, 40 j.),

"Jes, ĉar ĉie mi trovas samideanojn" (usona geodeziisto, 70 j.),

Opinioj de esperantistoj, la cititaj kaj la necitita plimulto, kune kun indikoj, postuloj kaj sugestoj de aliaj turistoj kaj de la esplorita ĉiĉeronaro estas profititaj por konstrui la idealon de personeco funkciebla en la turisma edukado.

LA KONKLUDOJ

Hipotezoj, argumentoj kaj tezaro prezentitaj ĉi tie estas rezulto de mia longjara partopreno en turisma movado kiel ĉiĉerono.1/ Ili estas ankaŭ efiko de la esploro rilate al 392 virinoj kaj 513 viroj, inter kiuj pli ol 300 esperantistoj el 28 landoj. La esploron aŭspiciis Andragogia Instituto de Varsovia Universitato gvidata de prof. d-ro Kazimierz Wojciechowski.2/

Ne senargumente la nuntempo estas nomata epoko de la turismo, kion konfirmas nombro de vojaĝantoj taksata ĝis 150 milionoj en unu jaro. Kiel kaŭzoj de la fenomeno estas konsiderataj: plilongiĝo de la vivo, pligrandiĝo de la enspezo en multaj landoj, evoluo de la transportiloj, mallongigo de la labor- kaj plilongigo de la libertempo de milionoj, urbiĝo de la mondo, evoluo de la klerigo kaj - fine - apogo al la turismo flanke de ŝtatoj kaj de UNO.

Laŭ la antaŭvido de la lingvosciencisto M. Pei la ŝancoj vojaĝi eksterlanden, se ne okazos neantaŭvideblaj katastrofoj, en la jaro 2000 estos 1:2.3/

La faktorojn determinantaj la edukajn efikojn de la turismo oni konsideras: rolon kaj pozicion socian de turisto, spertojn de turisto, personecon de turisto, valorojn de la vizitata medio, kondiĉojn de la edukisto.

La nuntempa turisma ĉiĉeronaro atingis kvantan ekfloron en multaj landoj, kiun en Pollando respegulas preskaŭ 12 mil ĉiĉeronoj, priservantaj dum la nuna jaro pli ol dek milionojn da turistoj. Dividataj je la uzinaj, urbaj, regionaj kaj montaraj (tatraj, beskidaj kaj sudetaj) ili priservas nur unu trionon de la ekskursoj, kies partoprenantoj atingas kompetentan klarigon.

Kun la impona evoluo kvanta ne harmonias la ŝanĝo kvalita, kies kaŭzoj estas diversaj kaj kies efiko esprimiĝas i.a. en la neplenumo de turismaj edukfunkcioj.

Apogiĝinte je la elektitaj aksiomoj, sociaj realaĵoj kaj propraj

spertoj oni formulis kelkajn hipotezojn koncernantaj rolon de ĉiĉerono en la turisma edukado:

1. El inter la personoj partoprenantaj turisman movadon ĉiĉeronoj (gvidistoj, kondukistoj) havas plej multajn eblecojn influi la turistojn.
2. Aspekto, konvinkoj, sintenoj, scio kaj scipovoj de ĉiĉeronaro estas atente observataj de turistoj.
3. Nescio pri la fakto devenas de ilia nesufiĉa kleriĝo, en kiu mankas precipe la elementoj de psikologio, pedagogio kaj sociologio.
4. La stato elvokas relative ofte situaciojn, dum kiuj la nescipovo agi koncerne al turistoj efikas kiel malaprobo por la modelo prezentata de la ĉiĉerono anstataŭ alporti aprobon, kio el la eduka vidpunkto estas ja nepra.
5. La staton oni povas plibonigi i.a. per ŝanĝo de la preparprogramoj, per unusignifa difino de la socia rolo kaj per priskribo de la ideala personeco de ĉiĉerono povanta servi kiel modelo en la edukado.
6. Por efikigi kaj universaligi la idealon, necesa estas ĝia akcepto de la ĉiĉeronaro, la internigo de la fundamentaj sintenoj, kies formiĝon ebligos la individua motivaro kaj la socia stimularo.

La hipotezoj estas konfirmitaj en multaj opinioj de la esploritoj, i.a. prezentitaj supre.

* *
*
* *

Konstruinte la edukan idealan personecon de ĉiĉerono, mi priskribis modelon de la reale renkontataj trajtoj kaj ecoj de la ĉiĉeronaro, sed ankaŭ mi difinis grupojn de la necesaj sintenoj: *la pornaturaj* kaj la *porkulturaj* (videblaj el la skizita skemo).

*Objektoj de turismaj interesiĝo kaj vizitado:* *La dezirataj sintenoj:*

p o r n a t u r a j

LA NATURO
- respekti la vivon
- protekti la naturaĵojn
- respondeci pri la natura medio
- harmonie kontaktiĝi kun la naturo
- ŝati la naturbelon
- ŝatigi aliajn al la naturo

p o r k u l t u r a j

LA KULTURO
- respekti la kulturon
- interesiĝi pri la kulturo
- kontaktiĝi kun la kulturo
- ŝati belon kaj grandecon de la kulturo
- konstante partopreni en la kulturo
- kree esprimiĝi
- kulture perfektigi la socian medion

La sintenoj karakterizu ĉiun ĉiĉeronan personecon, se ĝiestu preta por plenumi sian edukan rolon. Krom la personeco decidas tamen la socia rolo, kian oni permesas plenumi al la edukisto. La rolo kongrua, interne harmonia, apogita je la ekvilibro inter la rajtoj kaj la devoj de ĝia plenumanto, garantias edukan efikecon.

Spite al la supraĵa vidpunkto, ke oni eduku ĉefe la junularon, - profitante atingojn de la andragogio, oni pruvas la eblecon kaj devon eduki ankaŭ plenaĝularon, kiu i.a. dank' al la turismo povas partopreni la proceson de la konstanta memedukiĝo kaj atingi tion, kion - pro la sorta influo - ili ne ricevis dum la junaĝo.





## NOTOJ KAJ BIBLIOGRAFIO

1/

*ĉiĉerono* - (angle: guide, france: guide, itale: guida, ĉiĉerone)
1. La persono konvene preparita kaj rajtigita klarigi pri antikvaĵoj, muzeaj eksponaĵoj kaj turismaj objektoj.
2. La persono, kiun aŭ la vojaĝanto mem aŭ la vojaĝoficejo dungis por informi turistojn.

Laŭ: Internacia turisma vortaro. L' Académie Internationale du Tourisme à Monte-Carlo 1961. (pola eldono, p. 105)

2/

K. Wojciechowski: Kio estas andragogio? "SCIENCA REVUO" 1973. n-ro 4, p. 127-130

3/

Mario Pei: "Wanted: a world language". New York 1969, Public Affaires Pamphlet.

4/

*Sinteno* - relative daŭra, akceptita inklino konduti laŭ la sama, difinita maniero; la pozitiva aŭ negativa rilatiĝo al la samaj objektoj, personoj, situacioj ktp.

Laŭ: Malgranda psikologia vortaro. (Mały słownik psychologiczny), Warszawa 1965., "Wiezda Powszechna", p. 105

Krom la menciitaj estis profititaj jenaj verkoj:

Heliodor Muszyński: Ideał i cele wychowania (Idealo kaj celoj de edukado); Warszawa 1974.

Krzysztof Przecławski: Turystyka a wychowania (Turismo kaj edukado), Warszawa 1973.

Jan Szczepański: Elementarne pojęcia socjologii (Elementaj nocioj de sociologio), Warszawa 1972.

Kazimierz Wojciechowski: Wychowanie dorosłych (Edukado de plenaĝuloj). Wroclaw 1973.

* * * * *

*La teksto estas eltiraĵo el la pollingva disertacio "Rola wychowawcza przewodnictwa turystycznego" (La eduka rolo de turisma ĉiĉeronado), p[illegible]o IV, ĉapitro 3., kiu aperis libroforme kun Esperanta resumo.*

*La fotojn faris Antoni Walczak.*